PENSEO

N-ro 348
okt. / 2020

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 31-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Gafur Mirzo (Uzbekio)



Al fora belulino

Vidante Vin fote
agnoski mi devas
Kun Vi kara, rektan
renkontiĝon revas!

Spite ke Vi, kara
loĝas ja tre fore
Varman amosenton
havas mi enkore!

Se bonŝancos, kaj mi
vialande estos
Ŝajnas al mi tie
por ĉiam mi restos!

Vizitonte tien
jen, kion mi celos:
Aliajn amantojn
eble tuj forpelos!

Mi pro la Adoro
tiajn vortojn uzas.
Ne vidante Vin, mi
jen, kiel ĵaluzas?!

Al Vi, belulino
jen, deziro varma:
Estu ĉiam tiel
belega kaj ĉarma!

la 28-an de julio, 2020
Taŝkento, UZBEKIO

AL LA AMATINO

Nova gazelo (orienta klasika ĝenro de versaĵo) el Uzbekio

Por mi ĉiam Vi amatin'
valorega trezoro,
Senvaloras antaŭ Via
belec'perlo kaj oro.
Ripetante Vian nomon,
ho, mia ĉarmulino
Ĉiutempe kun ĝojego
batadas mia koro.
Ho, belulin' Ŝajnas al mi
ke Vi estas en mia
Vivĝardeno la plej bela
kaj ja alloga floro.
Tio veras, mia kara:
antaŭ Via harodor'
Tute ne gravas ja ĉiu
ajna bona odoro!
Vian belecon priskribi
kaj plenvoĉe kanti,
Estas mia ĉiutaga,
favorata laboro.
Ne atingi la kuniĝon
kun Vi mia sorĉistin'
Por mi estus en la Mondo
la plej forta doloro!
Ĝis la fino de l'korbato
mi devas senfinbeni
Pro Via ekzistado,
pro la Dia favoro!


la 12-an de aŭgusto, 2020
Taŝkento, UZBEKIO

Rita Mkrtchyan (Armenio)



Somero “pakas la valizojn”,
Senforta varmo de aŭgusta suno,
Somero estas nia “eta vivo”,
Sed mi atendas aŭtunon!
Ĉielo blua, ter’ floranta,
La mar’ karesa, la ripoz’, sunbruno,
Feliĉaj kaj liberaj tagoj,
Sed mi atendas aŭtunon!
Esperoj dum la tuta jaro,
Someraj rondoj, dancoj kune,
Pardonu min, somero gaja,
Sed mi pli ŝatas aŭtunon!
La vento, tondro, uraganoj,
Diluvo— kiel Dia puno,
Sopiro, senreviĝo, larmoj,
Sed mi tre ŝatas aŭtunon!

Tiberio Madonna (Italio)



BILDKARTO

Mi volintus ekspedi
bildkarton de Ĝenovo
al mia patrino.
En Paradizon.

Poste mi ekpensis
ke l’ Paradizo
ne ekzistas.



Hans-Georg Kaiser (Germanio)



Voko de l’papilio


Bela bunta papilio
vokis min sen vort’ al si.
Kia viglo kaj pasio,
kia flugo kun graci’!

Min fascinis ĝia belo,
la perfekta harmoni’,
ĝia danco en la helo,
la flirtado ĉirkaŭ mi.

Perpleksigis min la vesto
de l’ ensorĉa belulin’!
Ho, plej bela dam’ de l’ festo,
mi adoras, amas vin!



Papos Nascentes (Brazilo)



TRANSMUTA

Agorde al Esto surmonde
nur surmonde ŝanĝiĝas mi
rafinitas mi
al dura poezi’ de l’ lecioj
kliniĝas mi
aŭ per necesa sindeturno
vivanta varia
Surmonde mutacie
jenas ŝanĝo sola nura
ĉiutaga agordo
al Tiu Esto
Tio kiu estas. Ĉu?
Esto en ebleco
esti dum aga servado
kun aliul’ – sia Si mem
dise spegulita en aliul’
kiun vi estas, oblikva spegul’,
pala skizo de Ĉeesto
nek via nek de aliul’
sen strebo, dia, nuda,
Esto min akceptas, rikoltita pac’,
efemera ekstazo. Kial plu?

IO SPLENDAS

Splendas sanga freŝa frumateno
kvazaŭo kvazaŭe kvazaŭas
estonteco hodiaŭas fruas nunoveno
svenas la tria ridetas la kvina
knabece maskl-ina dio novedimensias
sia emo likve kristalas plenas
tio - ena-ekstera antaŭflaro ekflaras
into-anta-onta pleno splendo evento

freŝa sanga frumateno splendas

ridete sekreto burĝonas

kvieto ena one onas neniu plu insulas
ĉiu laŭplena eno tutplene ulas!
finfine kolektiva esto estas festas kune
nia eno-esktero radias kia lumo lume
ĉio sinkronisme iĝas sinkrono ono ono
nova Tero nova ero sparko aro
fajro bena fajro miena alĥemia fajro dia!
finfine alĥemia edziĝo nia pleno Tuto Ĉia!


POETO

via nekombita rigardo
vertikaligas horizontojn
marajn
sen faligi ŝipojn

via ventokapa lingvaĵo
reversas sunsubirojn
varmajn
sen kaoso-instaŭro
astrokolapsado

via esto sentakta
malfermas en spacoj
nuraj
sen tempo diversa
ĉesu esti diversa
unuo!

Ivanichka Magharova (Bulgario)



PLUVO

Pluvo
frapas sur la fenestro
La infaneto
dormas kun rido
sur sia vizaĝo.
Songâs ĝi
la kison de la patrino
Ŝi
laboras duan brigadon
kaj baldaŭ venos!
La patro
estas ie en la mondo
laborante pro la pano.
Pluvo
frapas sur la fenestro.
Mateniĝas.
La mateno
estas kovrita per
la purpurkoloro de la Dioj!
Sed en la ĉambro
daŭras la silento!
Pluvo
frapas sur la fenestro.
La tago
komencas denove.
La floroj velkas
soifaj por konsolo.
En la ĉambro
estas silento!
La vortoj mortas!
Pluvo
frapas sur la fenestro.
La pordoj grincas
forlasitaj sen amo.
La tago
mortas kruela kaj
Indiferenta.
La doloro restas!
Pluvo
frapas sur la fenestro!

***

Foriris l'nokto
ekpezigita de amo.
Silentas lito.
Mia fenestro
nokte vin rigardas.
L'amo doloras.
Patra sojlo, pord',
verdiĝas la vojeto.
Vagas senhejmul'.
Frostiga Sechko
blankkovrilojn arigas.
Ŝafido blekas.
Mia pomujo
ree vin ektuŝas.
Barilo mankas.
Kun amo Dio
paradizhomon kreis.
Sed li Lin neis.
L'somero spiras
ekpezitajn grenspikojn
La hajlo gvatas.
Sin rigardas en
la roson l'ora suno.
Raneto saltis.

Wally Du Temple (Kanado)



Mia Mio!

Mia mio, pandemio!
Skua ŝoko por kompano.
Panojn! panjo, pandemio!
Hejmen venu ame.
Panjo, panojn, ĉiutagajn!
Pano agas vive.
Knedu paston,
Por la vivo.
Bloku Pandemion!
Panjo faru panojn
por kompano, faru, faru!
Paneon planas pandemio.
Farunon gistu ame.
Knedu, knedu kaj jes sale.
Formu mane, mane, mane
Fajru fajnajn fornojn
Blankajn blankajn la panbulojn
En fornen puŝu, puŝu
Zorgu, zorgu viajn fingrojn
Ne ferfornon tuŝu
Novbakita la panbulo
Krakas krakada sono
de krusto ore firma.
Prikantu buterpanon.
Haltu, haltu la buteon!
Pandemio, mia mio!

***

Leviĝas
parfumoj
la aromoj
Glitas butergutoj,
varme, dolĉe, lange.
Greno ame transformita
Ŝildo spade ŝirma
Grena grenato tre bongusta
Eksplodigos pandemion!

Blazio Vaha (Hungario)




Pesimismetoj malnov-gramofonoj

Pordo. bela pordo...
trans la bela pordo
regas plu malordo.
Metas ni ornamojn,
signojn kaj insignojn
sed regas mismetoj.
Laŭrojn ni disdonas,
al ni mem imponas
niaj pra-disketoj.
Mi pesimismetas,
ci pesimismetas -
ni pesimismetas.
Sonas mismetitaj
niaj pra-disketoj:
niaj pra-diskutoj:

T i o estas kia?
Kio estas t i o?
K i e estas io?
***
Kio estas kio?
Kio estas kia?
Kio - estas - kie?

la 19an de Aŭgusto 2020a

Iskouhi Avetiqian (Francio)




Viv-rigardo...

La tempo forflugas rapide,
Lasinte nin nur rememorojn...
Ni gardas ĝin en koro fidele,
Neniam forgesinte mil sonĝojn.
Patrino! mi ŝatus vin revidi;
Venu dum nokto trankvile
Por miajn vangetojn rekisi
Ĉar vi mankas al mi tre multe!
Patro! Mi bezonas konsilon
Tiel, kiel dum mia infaneco.
Rigardu! Prenu mian manon
Varmigu ĝin, kiel dum frosteco!
Senĉese birdetas la tempo,
Dume, ke ni ankoraû junas;
La tempo forflugas, kiel vento
Ŝajnas, ke vivo jam flugadas!

30/09/2018, Francio


Zara Sarkissianne (Francio)



Konstruis ŝi domon apud bela lag',
Kie la anasoj promenadis trankvile,
Dum bela veter' ŝi boatadis kelkfoje,
Admirinde pri la akvofalo ĉiutag'
Plantis ŝi florojn en propra ĝarden'
Prizorigis akvuminte regule ĝin,
Jen! Kreskis la floroj kaj ĝuigis ŝin
Kun belec' similante al floroj de l'Eden'.

21/09/2020

Jadranka Miric (Serbio)




Disiĝo

Neatendita doloro
ne povis esti regita!
Vi volus forte ekkrii,
blasfemi , eĉ fi fajfi!
Ŝia "adiaŭo" eĥis.
Mi larmis pro ne plua kis'
Kaoson mi vidas ĉie,
Turniĝis mi al preĝo pie.
Ŝtopita estis mia menso
de viaj malicaj ridoj,
de viaj ne eldiritaj pensoj,
de miaj tristaj versoj!
Ho, amatino
de sekreto filino ,
vi nudigis min
pro via egoista sin'.

Aŭtunas

Oriĝas suna sunsubir'.
Mildas venteto kun foliar'
Tre ĝojas nia kunir'.
Rendevuas bela par'.
Estis seka ĉi somer'
ploras suferanta ter'.
Ruĝas aŭtuna mantel'
samkiel alta ĉiel'.
Ŝtormoj foje tre timigas
flugantajn birdojn al Sud',
Foje allogas tiu lud',
tamen Aŭtunon ni amas.

Siranush SLAGMULDER (Francio)



ESPERO

Novmondon oni atendas senpacience,
Kiam fortaj ventegoj trapasus venonte,
Ni havus la Naturon pli kaj pli belege,
Kun puregа blu' ĉiel' sur la Ter' verdege.
Oni ne scipovus mortigi Natur-Patrinon

Ĉar bestoj ribeligus kun fiŝoj kaj birdoj
Kontraŭ avara kaj sovaĝa hom-bestego
Kiu bojas kun malamo kaj kraĉadas ĉien.
Kun ruĝaĉaj okuloj, kiel lupo malsata
Jen, la hom' glutegas tutan ĉirkaŭaĵon
Kun dentegoj akraj, kiel ĉe drako sanga
Ne diferencigante sian predan aĝon.
Novmondon oni atendas senpacience,
Kiam fortaj ventegoj trapasus venonte,
Ni havus la Naturon pli kaj pli belege,
Kun purega blu-ĉiel' sur la Ter' verdege.



Alveno de l'Aŭtuno

Jam temp' al temp' pluvetas,
Ŝajne, ke la vetero ploretas,
Absorbas la tero pluvgutojn
Falinte el nubplena ĉiel-sino.
Nune, kiam la nubĉiel' tristas
L' ardeo pensas nur pri varmec'
Senĉese ĝi kun gracio kantas
Pri splenda temp' de l' abundec'
Kaj migras en sublandojn la birdoj
Kunportante proprajn rememorojn,
Pri ĉi-seka kaj pasinta somero,
Ankaŭ, pri la sufer' de seka tero.
Venontan jaron revenos ili,
Eble en la sama bel-lando-ĉi,
La neston sur arben farinte
Idojn kun feliĉ' kreskigos ili...
Sed la veter' ŝanĝigas rapide,
Sian nature-mantelon ĉiutage,
Aŭ eltiras ĝin kunvolonte
Aŭ sin protektas sub pluv' ombrele.
Aŭtuno proponas kelkajn ludojn
Kun la Suno kaj kun venta pluvo
Pentrinte milojn da bel-koloroj
Sur riĉa mantelo de arbaro.

17/09/2020

Siv Burell (Svedio)



La lernejo

Ni kredis je lernejreform'
diverseco estu nun la norm'
ni traktu lernantojn respekte
kaj gvidu la studojn korekte



pentraĵo de la aŭtorino

Sed kio okazis?

En paŭzoj kaosaĉe
skribaĉe , fumaĉe,
viktimigo de infano
sed politika dokumento nur
raportas pri sano.

Kion ni povas fari ?

Ek al lernejo, rapidu
vi aktiva viziulo, kaj fidu
ke devas esti kvieto
kaj respekto por ĉiu infaneto!

Mimoza Ahmeti



Evidente vi estas ja azeno

Bela vizaĝo iam, nun stigmatika,
En viaj spuraĵoj mi trovas la murdon vin trafinta,
Ni, la perditaj, forlasitaj virinoj viaj, ĉu ni saviĝis de vi eskapintaj,
Por pluresti ie vivaj
Je sentimenta almozado.


Bela vizaĝo ankoraŭ hodiaŭ, spite la
rompiĝon, la dubon,
Kaj la putriĝon,
Rampanta kaj perdiĝanta korpo en
malbenita tero.
Vigana kaj samtempe malesperigita maso.

Orelringo iel instigas la sencon de la
vanteco.
Ĉiutage ĉe vi perdiĝas io el la stela kvalito,
Elĉerpiĝas en la sablo.
Ĉiunokte vi akiras ion el la morta nemorteco.
Ho, nun estingiĝante, dum ankoraŭ
estingiĝas
Flirtigas vi en la aeron terurajn tentaklojn de
la diboĉa soleco
Per vipanta tirŝnuro mi ilin kaptas, eltiras
kaj premas,
Sklavigas,

Per la sterilaj lipoj, la nesenteman korpon
Ofte mi enfalis en la spuroj de via rompiĝo,
diboĉeco
Je la oblikva maniero de la apero, venenado,
Kaŝado, sofismo, ŝanceliĝo, neestado,
Je tiu nestabileco kiu apenaŭ povas starigi
bazon.
La luksa sentimento, esence detruiga,
Kvazaŭ la katoj, brustojn de forlasitaj
virinoj erodas.
Bela vojperdinto daŭre perdanta,
Scipovanta konduti kvankam la etiko vian
spiriton ne plenigas.

Mi estas la via, min vi ja havas, ĉiam min vi
havas,
Apogon, animon, padon al la seneliraj vojoj,
Sed vi ne komprenas, ĉar azeno vi estas,
Kaj tio estas la kialo
Ke mi amas vin terure.

Elalbanigis



Bardhyl Senimi
(Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Su Shi (1037-1101)

Trans la arbaro en verdpur'

—laŭ melodio *Perdrika ĉielo*

Trans la arbaro en verdpur'
apikaj montoj klaras,
videblas la duonkaŝita mur'.
Velkintaj herboj
malorde flosas sur
lageto kaj cikadoj ĉirpas
per tumultaĉa la susur'.
De temp' al tempo
la blankaj birdoj tra l' nebul'
flirtflugas tien kaj ĉi tien.
Elspiras ruĝaj lotusfloroj
aromon en la laga akvolul'.

En sovaĝejo ekster la vilaĝo,
ĉe la urbmur' antikva, mi
malrapidpaŝe vagas
kun irbastono sen kor-kri'.
Kaj baldaŭ l' suno
sin klinas kun malrekta lumradi'.
Lastnokte la ĉielo komplezeme
disŝutis la pluveton kun magi',
ke mi kiel vagabondo ĝuas
dumtagan friskon ja en ĝojebri'.

Hela luno prujne blankas

—laŭ melodio *Ĉiama ĝojo de renkontiĝo*

Kiam mi tranoktis en la Domo Hirundo, mi sonĝis pri gejŝo Panpan kaj pro tio mi verkis la jenan poemon.

Hela luno prujne blankas,
bona vento friskas kiel akvo klara.
Nokt-pejzaĝo senvuala
etendiĝas al senlimo.
En zigzaga roj' sensala
saltas fiŝoj supren jen de temp' al tempo.
Rosoj perlas en serio fala

de sur larĝaj la lotusfolioj
en zefira pelo.
Nokt' kvietas kaj neniu
ĝuas la pejzaĝon de noktbelo.
Jam alblovas horobatoj
de noktmezo al orelo.
Folifalo sur la teron ŝajnas
laŭta krako eĉ en tia noktfabelo.
Eĉ la sono vekas min el songô,
kaj mi ne sukcesas trovi en malhelo
la pejzaĝon belan, promenante
trae en la korto sen espero.

Mi jam lacas pri vagado
aliloka por oficial-afero.
Rigardante la revenan vojon,
mi amare kun pensopelmelo
eksopiras al hejmloko.
De l' Etaĝdom' Hirund' la sfero
jam malplenas kaj, ve,
ne troveblas ŝi anĝelo.
Nur duopo da hirundoj
nestas en ŝlosita ĉelo.
Tempo nuna kaj antikva
pasas kiel songô pala.
Tamen kiu povus ja vekiĝi
el la songô al la viv' reala?
Trista la vidaĵo de la domo
kun malnova ĝoj' sentimentala
kaj malamo nova lamentigas
en sufer' amara.

Nokte mi iradis

—laŭ melodio *Feo ĉe rivero*

Nokte mi iradis inter
ebriiĝo kaj sobriĝ' sen konsci'.
Kiam mi revenis hejmen,
ŝajnis jam noktmeze sen lumstri'.
La servknabo tondre ronkis,
ne respondis al pordfrap' kaj kri'
miaj. Senrimede kun irstang' enmane
mi aŭskultis al ondsonoj sen pasi'.

Mi tre ofte plendas, ke mi ne plu
povas regi min mem,
ĉar mi ĉasas nur kun ĝu'
famon kaj profiton ja senĉese.
Volus mi veturi laŭ akvflu'
per boato sur ondetoj en kvieta vento
kaj vanui de ĉi tie, nu,
kaj pasigi la restantan vivon
sur la akvoj sen enu'.

Pingshantang-halo

—laŭ melodio *Luno super okcidenta rivero*

Mi iam preterpasis ja trifoje
Pingshantang-halon jen dumvoje.

Mi jam pasigis mian viv-duonon
kiel eligas fingroj klakad-sonon.

Ne vidas mi jam de dek jaroj
la fean maljunulon* kun grizblankaj jaroj.

Nur lia suskribaĵo sur rokmuro
ĉizitas forte kiel serpent-kuro.

Mi verkas la poemon por
prikanti lian personecon el la kor'

kaj liajn versojn pri printempa vento
kaj pri salikoj ja el lia verk-talento.

Ne diru, ke postmorte homo
meritas nulon en renomo.

Eĉ la reala vivo estas ja malplena
kiel la songô, kvankam bela, tuj elsvena.

**La fea maljunulo aludas al Ouyang Xiu (1007-1072), fama poeto de Song-dinastio de la antikva Ĉinio.*

Pavilono Kŭajzaj

—laŭ melodio *Preludo de akva melodio*

Levinte la broditan fenestrokurtenon,
rigardas mi al foro
en lum' de subiranta suno.

Sub pavilono Kŭajzaj en ĉi horo
la akvo kaj l' ĉiel' interligiĝas
ĉe horizont' en blu-koloro.
Mi scias, ke vi ĝin konstruis
pro mia alvizito, kun fervoro.
Vi speciale ĝin jen lakis ruĝe,
kaj la fenestr' farbita freŝas
pro via pen-laboro.
Memoro mia iras al la sceno,
kiam mi kun trankvila koro,
apogante min sur kapokuseno
jen en Pingshangtang-halo kun langvoro
spektadis la pejzaĝon de sudlando
en pluva fumvaporo.
Sovaĝansero sola eĉ ne videbliĝis
ĉe l' ĉiellimo en lumgloro.
Mi ekkomprenas el poem' de
Ouyang Xiu*, olda la sinjoro,
ke l' sceno, kiun li priskribas,
ja belas en malklara la dekoro.

La vasta akvsurfaco klaras pure,
spegulas vere verdajn montojn.
Subite ondoj skuas la boaton rule,
la olda blankharulo ĝin rudras firme.
Pedant' ridinda ja insistis dure,
ke vent' aŭ maskla aŭ femala estas.
L' eldir' absurdas ja terure.
Se oni havas ambicion en la koro,
li povas ĝui ĝojon jen plezure
eĉ en disadvantaĝa pozicio,
kiam la vento blovas jen ulule
skuante teron kaj ĉielon,
kaj li regas ĉion tutsekure.



Ouyang Xiu: fama poeto de Song-dinastio de antikva Ĉinio.

elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Meng Jiao (751 -815)

Kanto de vojaĝanto

Fadeno en la mano de l' patrino,
vestaĵo de la vojaĝonta filo.
Kun tim' pri lia reveno malfrua
ŝi kudras, ke firmiĝu l' korpŝirmilo.
Kiu do diris, ke herbeto povus
repagi al printempa sunobrilo?

Zhu Qingyu (? - ?)

Novedzino sin ornamanta

Ruĝa kandel' en nupta ĉambro tutanokte
flamis,
matene ŝi salutos bogepatrojn en salono.
Ĉu mia tualeto – kiam ŝi sin mem ornamis –
laŭmodas? Edzon ŝi demandas en subtila tono.

Plendo de honordamoj

Izolas pompajn florojn la ŝlosita kortopordo,
du belulinoj solaj staras en jad-galerio.
Koviĝas pri palacaj la aferoj l' afekcio,
antaŭ papago ne kuraĝas vibri korokordo.



Li Pin (818 - 876)

Transpasi la riveron Han

Trans montoj hejma vivosigno senas,
forpasas vintro, kaj printempo venas.
Sentmikse mi proksimas al vilaĝo,
demandi pri ĝi mankas la kuraĝo.

elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-TRIA

Gengsang Chu

§23-01

Inter la disĉiploj de Laŭzi estis iu nomata Gengsang Chu, kiu sola kaptis la esencon de la doktrino de la majstro. Li iris norden al la montaro Weilei kaj ekloĝis tie. Li maldungis tiujn geservistojn, kiuj paradis per sia lerteco, kaj tenis sin for de tiuj kromedzinoj, kiuj fanfaronis per sia humaneco kaj justeco. Li loĝis kun tiuj, kiuj estis simplanimaj kaj mallertaj, kaj dungis sole tiujn, kiuj sciis nur diligente labori.

Tri jaroj pasis post la alveno de Gengsang Chu, kaj la rikoltado fariĝis abunda al Weilei. La tieaj popolanoj diris unu al la alia:

"Kiam la majstro Gengsang Chu venis inter nin, ni tiam trovis lian konduton tre stranga. Se ni nun observas lin laŭ la tago, li ŝajne faras nemulton; se ni observas lin laŭ la jaro, li ja faris multe pli ol ni atendis. Li povus esti saĝulo! Kial ni ne pagu al li nian tributon da laŭdoj kaj konstruu templon por li?"

Aŭdinte tiujn vortojn, Gengsang Chu sidis kun la vizaĝo al la sudo kaj sentis sin malgaje. Kiam liaj disĉiploj miris, li diris al ili:

"Pro kio vi tiel miras? Kiam la vitala energio de la jango kreskas en la printempo, diversaj plantoj komencas flori, kaj poste, kiam la aŭtuno venas, diversaj fruktoj komencas maturiĝi. Ĉu la printempo kaj la aŭtuno povus tute senkaŭze funkcii en tia maniero? Tio ŝuldas nur al ilia sekvado de la natura evoluo de la estaĵoj aŭ de la Taŭo de la ĉielo. Mi aŭdis, ke la perfekta homo sidas senmove kaj kviete en sia malgranda ĉambro enfermite inter kvar muroj, dum ordinaraj homoj estas liberaj sekvi sian naturan inklinon kaj de tempo al tempo moviĝadas sen scii kien iri. Nun ke la popolo en Weilei flustradas inter si pri tio, ke mi devos esti diigita, ĉu tio ne signifas, ke mi jam fariĝas la centro de la atento? Jen kial mi, pensante pri la instruo de la majstro Laŭzi, sentas min malgaje."

"Vi ja ne devas esti malĝoja," diris la disĉiploj. "En fosaĵo profunda je ok *ĉi*-oj kaj longa je dek ses *ĉi*-oj grandega fiŝo apenaŭ povas sin returni, sed malgranda fiŝo povas libere naĝadi. Sur teramaso alta je ses aŭ ok *ĉi*-oj granda besto apenaŭ sin kaŝas, sed ruza vulpo trovas tie por si sufiĉe bonan kaŝejon. Cetere, honori la virtulojn, enoficigi kapablulojn, respekti kaj rekompenci ĉiujn bonfarantojn kaj utilo-alportantojn, jam fariĝis kutimoj de post la tempoj de la reĝo Yao kaj la reĝo Shun. Kial do la popolo de Weilei ne devus sekvi tiajn kutimojn? Majstro, konsentu do ilian deziron."

"Alproksimiĝu, miaj infanoj!" diris la majstro Gengsang. "Besto sufiĉe grandega por teni ĉaron en sia buŝo apenaŭ povas eskapi el la enfalujo aŭ kaptilo, kiam ĝi forlasas sola la montan arbaron; fiŝo sufiĉe grandega por engluti boaton povas suferi pikadon eĉ de la formikoj, kiam ĝi estas ĵetita de la akvo sur la bordon. Tial la birdoj kaj la sovaĝaj kvarpieduloj ĉiam amas la altecon, kaj la fiŝoj kaj la testudoj ne forlasas profundan akvon. Tiuj, kiuj volas teni sian korpon bonstata kaj kulturi sian naturon, preferas sin kaŝi en profunda kaj izolita loko kaj neniam ĝin forlasas! Plie, ĉu do vere la reĝo Yao kaj la reĝo Shun meritas esti laŭdataj kaj glorataj? Iliaj paroloj kaj praktikado estis tiel vanaj kaj tiel malutilaj kaj frivolaj, ke oni povus priskribi tiele: ili estas kiel homoj, kiuj fosas truon en muro por kreskigi malutilajn herbojn; aŭ kiel tiuj, kiuj elektas harojn por kombado aŭ kalkulas grajnojn por kuirado. Kiel do tiaj frivolaĵoj povus savi la mondon? Elektado de virtuloj provokas konfliktojn en la popolo; enoficigo de saĝuloj instigas la popolon al reciproka ŝtelado aŭ rabado. Tiuj kutimoj neniel povas plibonigi kaj honestigi la popolon. La popolo estas tiel avida je profito, ke pro ĝi filo mortigas sian patron aŭ ministro murdas sian reĝon. Okazas rabadoj eĉ en plena taglumo kaj domŝteladoj ĝuste ĉe la tagmezo. Mi volas diri al vi, ke la malordo kaj la konfuzo devas havi sian radikon en la tempoj de la reĝo Yao kaj la reĝo Shun kaj doni fruktojn dum postaj mil generacioj. Mi estas certa, ke post mil generacioj la homoj nepre

sin manĝos reciproke!"

Elĉinigis



Wang Chongfang


(Ĉinio)

Ĉineske

Yanke (Ĉinio)

Laŭrflora aromo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*



En
aero super ĝarden'
disŝvebas
dolĉa aromplen'.

Flor'
laŭra spiras en ĉi hor'
aromon
en venta favor'.

Per
grajngranda korp' en aper'
ĝi pavas
en sunluma hel'.

Al
okul' ĝia flava pal'
ja plaĉas
sur eta petal'.

Ĉu
ĝi donas per aerflu'
aromon
jen al nia ĝu'?

** Dekses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimarangô a,a,xa (x=senrima)*

Jadranka Miric (Serbio)

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Malfrua aŭtuno

Griziĝas
ĉiela nubar'.
Ho, ŝtormo alvenonta
kie kaŝis sin birdar'?
Sub branĉfoliar'!

Odoras
tero laŭ pluvo.
Strata riveret' fluas
kiel larĝa bankuvo
de natur' pruvo!

Aŭtunas.
Pluvas okcidente
Varmegas oriente .
Dancas folioj vente !
Larmoj korsente!

Velkintaj
herboj mortaĉis.
Eĉ morta falis koten.
Herbaĉoj ĉie kreskis.
Suno bonvenas!

Freŝiĝas
de montoj altaj.
Randevuas aŭtuno
kun insuloj glaciaj.
Ŝanĝiĝoj fiaj! !

Alflugis Septembro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Oriĝas
aŭtuna vesper'.

Super mi alten flugas
gaje birdoj tra aer'.
Folioj sur ter'.

Sur ĉiel'
luno vaganta
inter brila stelaro.
Nokto kosme floranta.
Stelar' tremanta.


Aŭtuno
multkoloriĝas.
Branĉaro aŭ flaviĝas
aŭ foliar' bruniĝas,
putre nigriĝas.

Aero
ĉi-nokte freŝas
Ni pli facile spiras.
Domoj nun bonodoras.
Naturo mildas .

Varmego
sufokas aer'.
Prokrastita somero.
Ŝajnas diabla veter'
pluvas sur la ter'!

**Sopir-al-sudo: ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Elena Popova (Bulgario)



LA VOJETOJ

La vojetoj estas paŝosignoj de multaj homoj, kiuj pasis antaŭ vi. Ili estas rektaj aŭ kurbaj, mallongaj aŭ longaj, puraj aŭ surkreskitaj per herbo, kiel la vivo de la homoj. Iuj homoj ne pensas pri tiuj, kiuj paŝis antaŭ ili, ne pensas eĉ pri siaj paŝsignoj, kiujn ili postlasas. Sed unu kurba paŝo estas ankaŭ kurba penso, unu stampo sur iu loko – sendecidemo, unu mispaŝo en la koto – ho, vi ne permesu tion!

Se vi decidas fari vian vojeton, antaŭe pripensu kien kaj kial vi ekiros, ĉu por bono aŭ pri malbono. Vi petu helpon, por ke estu rekta via vojeto, ke sur ĝi iru ankaŭ viaj infanoj.

Terparteto, piedpremita, sed skizita de la penso kaj animo homa, ĉu ni memoros vin? Kaj se jes, kiel?

Shi Chengtai (Ĉinio)



La poezio neniam submetiĝi

Kiam la lingvo Esperanto venis en Ĉinion, kiun ĉinigis iu Aisibunandu (爱斯不难读) laŭ ĝia prononco. Mi komprenas ĉi tiun nomon en la ĉina lingvo je du sencoj, nome Aisi kaj Bunandu: Ai-si signifas ami ĝin, kaj Bu-nan-du signifas facile ellerni. Oni scias, ke Esperanto estas facile ellernebla pro ĝia logikeco kaj scienceco, do mi parolos pri la Amo al la lingvo Esperanto de samideanoj.

W. Auld parolis: "Ĉar lingvo estas antaŭ ĉio afero emocia kaj ne racia." Li ankoraŭ parolis: "estas necese rekoni plue, ke ankaŭ sennombraj esp-istoj, hieraŭ kaj hodiaŭ, rilatis same emocie al sia elektita lingvo, al sia kara verda lingvo, al Esperanto…" Tia emocio preskaŭ similas al la pia sento al tiu de l' adeptoj de religio. Dum la plej frua periodo de la esperanta historio, multaj samideanoj esprimis per poemoj sian amon al sia kara lingvo Esp-o, eĉ spite, ke iuj mokis tiujn versojn monotona "la verda temo". W. Auld parolis plu: "Do la emocio estas natura kaj ne hontinda faktoro en nia esperantisteco. Estas pli laŭmode, nomi tion hodiaŭ "ideologio", ĉar tiu vorto almenaŭ ŝajnas pli scienca – pli objektiva ĝi ja ne estas. Pli aŭ malpli forte ni ĉiuj ligis nin ideologie al la koncepto de neŭtrala artefarita lingvo kiel dua lingvo por ĉiuj homoj; kaj tio implicas, ni devas rekoni, konceptojn pri homa egaleco kaj homaj rajtoj, eĉ se tion nur nebule konscias kelkaj el tiuj, kiuj tamen lernis Esperanton. La ideo mem pri Esp-o nepre entuziasmigas kelkajn animojn, kiel ĝi

mem evidente malentuziasmigas aliajn – same pro motivoj ideologiaj, plejofte senkonsciaj.”[1]

La disvastigo de la lingvo Esperanto bezonas la grandan kontribuadon, eĉ dediĉidecon de samideanoj. W. Auld parolis: “La dediĉiteco de Zamenhof estis kompleta, sed por sukceso necesis ankaŭ dediĉiteco de sennombraj aliaj homoj en la tuta mondo. Kaj fideleco de la esp-istoj al sia afero, eĉ fronte al karcerigo kaj eventuale morto, estas konata. Pli ol unu registaro malpermesis la lingvon kaj persekutis la esp-istojn; kaj tamen, kiam fine forpasis tiu koŝmaro, la esp-istoj reaperis kaj daŭrigis sian agadon.” Li donis al ni la ekzemplon, ke Aleksandro Logvin, ukrajna esp-isto, kiu estis arestita dum la “Granda Purigo” de Stalin, konfidis al sia patro bone konservi liajn manuskriptojn kaj revuojn en Esp-o, kiujn lia patro kaŝe metis en abelujon, tiel ni poste povas legi lian poemaron Sur *Vivovojo* eldonitan en 1964.

W. Auld parolis plu: “La vivkapablo de Esperanto malgraŭ militoj, persekutoj, pogromoj kaj ankaŭ la indiferenteco de la plimultaj registaroj kaj la popolamasoj, tute klare ne dependas de la seka logiko kaj frida objektiveco, sed jes de varma idealismo kaj sento de la “homaraneco”. Nia lingvo vere estas “kara” al ni kaj penetras ĝis en niaj plej intimaj animoj – kompreneble, mia uzado de tiu vorto “animoj” suspektigas nin en la okuloj de tiuj, kiuj rifuzas al Esp-o vivrajton!”[2]

Ĉi-momente mi tuj memoras pri nia povra juna poeto Armand Su（1936 - 1990）! Lia fideleco al nia Afero kaj dediĉiteco ja estas la plej elstara modelo. La jaro 2020 estas la 30a jubileo de la forpaso de Armand Su, kion faros por li la ĉina Esp-movado? Mi ne scias, sed mi memoras pri li, nomata “Nova stelo ekbrilis en Oriento sur nia literatura horizonto”, deziras paroli pri li al la juna generacio. Do trovinte lian poemaro *Poemoj de Armand Su*, kiun Guozhu kaj mi redaktis, eldonis Ĉina Esperanto-Eldonejo en 1992, mi eklegas denove. Pri lia vivo kaj kreado mi jam parolis en la antaŭparolo, *La vera animo de poeto*, de tiu ĉi poemaro, do, mi nur temas pri liaj poemoj ĉi-foje.

Armand Su estis liriko-kantisto, li kantis pri sia patrujo, ĉar li amis sian patrujo, en la poemaro la unua poemo estis verkita en 1962, *Mi amas vin, Ĉinio*:

En la mondo estas multaj belaj lokoj,
Kiuj ofte vekas mian fantazion,
La antikvaj Piramidoj de Egiptujo,
La mistera blanka nokto de Rusujo,
La ĉarma krepusko ĉe Sejno,
Kaj la meznokta suno de Norvegujo…
Sed, nur vin mi plej amas – bela Ĉinio!



Armand Su (1936 – 1990)

Post la abiturientiĝo li havis nek laboran postenon, nek enspezon de salajro, fariĝis nomata “junulo atendanta laboron”, tamen li posedis la tempon kaj (laŭ parolo de W. Auld) “la ideologian” liberon. Do, lia spuro preskaŭ restis sur diversaj lokoj de la tero tra la tuta patrujo, tio ja koincidis kun la tradicio de la ĉinaj antikvaj intelektuloj, nome “paŝadi tra vojo da mil lioj, legadi librojn de dekmil volumoj. En Huhehaote, la ĉefurbo de la Interna Mongola Aŭtonoma Regiono, antaŭ la Verda Tombejo de s-ino Wang Zhaojun, lia inspiro ŝvebis:

Oĥ, Ĝaŭĝjun, povra belulino rara,
Kiom vi suferis en senfina dolor'!
Revidi la ĉielon de Patruj' kara,
Nur vane sopiris via juna kor'!

En urbo Datong, prov. Shanxi, li pilgrimis al la fame konata ŝtona statuo de Budao:

Mil jarojn vi jam estas en dormo,
En ĉi antikva templo obskura.
Vin ne timigas la monda ŝtormo,
Kaj nek ĉi la mallumo terura.
……

Li turisme vizitis la Sepstelan kavernon, Insuleton Gulangyu; grimpis sur la monton Lushan; vojaĝis trans la maro al Insulo Hainan kaj tra la Granda Nordokcidento. Liajn poemojn, kiujn li versis dum la vojaĝa vojo, hodiaŭ ni povas legi. Li eĉ versis pri renkontiĝo kun oldulo vendanta teon sur strato de urbo Baotou:

Vi min invitis trinki
Glason da varma te'.
Al via gastama gest'
Ne eblas respondi: ne.

Vi purigas la tableton.
Ni sidiĝas vid' al vid'.
Mian vojaĝon vi benas
Per ĉi afabla invit'!

Se nia poeto Armand Su ne estus kun la naiva animo, do sub lia plumo ne aperus ĉi tia sentopura poemo.

La plejparto de liaj poemoj en la juna periodo estis kanti pri la Amo. Vivante en la granda urbo Tianjin, senlabora li ankaŭ malofte partoprenis en la tiama agado de la Politika Studo; por studadi fremdajn ligvojn (li scipovis ĉirkaŭ 20 lingvojn) ĉiutage li frekventis rondon de enmigrintoj el fremdlandoj loĝantaj en la urbo. Li preferis la okcidentan muzikon, eĉ L. V. Beethoven fariĝis lia idolo. Lia penso estis relative libera disde la ĉefinflua ideologio de la tiama reĝimo. Lia serĉado kaj aspiro al la amo estis sen ajna tabuo kaj malkovro, ĉio ĉi estis tute esprimata en liaj poemoj. Kaj la malsukcesa fianĉiĝo kun f-ino Carol ankaŭ lasis melankolian spuron, nu, poetoj plejparte ja estas sentimentalaj!

Pri mi

Oni min nomas Armand eta
Pro mia vizaĝo triste pala,
Pro mia kor' tro sentimentala
Kaj la eterna melankoli' poeta.

Sed tiu Armand de Dumas fil' kreita
Certe ne reprezentas min entute.
Lin povas mi envii nur mute,
Ĉar mankas al mi ankaŭ Margarita.

Se ni dividas la poezian kreadon de Armand Su en du periodojn je 1966, do plejparto da poemoj en lia unua periodo estis kantantaj pri la amo kaj la belaj vidindaĵoj tra la lando, tiel iuj samideanoj el ni rigardis lin dandon. Ne! fakte la amo sub lia plumo estis plena de la juneca viglo kaj serĉado al bela espero, de la aspiro al vereco, boneco kaj beleco, tamen pli plena de ia naiveco. Lia animo estis pura, preskaŭ similas al malplena papero, tion konsentas tiuj, kiuj iam lin kontaktis persone.

Alvenis La Granda Kultura Revolucio lanĉita de la Granda Gvidanto Maŭ (en 1966), tiam esp-isto Armand Su korespondis internacie, verkis fremdlingve kaj publikigis siajn poemojn en gazetoj eldonitaj en fremdlandoj, tio ĉio estis rigardita la "krimo havi kontraŭleĝajn rilatojn kun fremdlandoj". Li estis kritikita kaj denuncita en la kunvenoj okazigitaj de la Amasa Komitato de kvartalo, en kiu li loĝis. Lia kara tajpilo estis forrabita, kiam la "ruĝaj gvardianoj" traserĉis lian hejmon, pro tio li kriis dolore:

Mia skribmaŝino dum dek jaroj
Akompanas min sur vivovojo.
Pri miaj literaturaj faroj
Ĝi atestas kun trist' aŭ kun ĝojo.
……
Ho ve! mia skribmaŝino kara!
Ĝi – rabita for, ne plu revenis.
Larmis mi dum nokta hor' amara.
Kiom longe tio min ĉagrenis.
……

Por eviti la turmentadon de "la kritikado kaj batalado" kontraŭ li, Armand ĉiutage kun libroj fuĝis en parkon aŭ en la urban bibliotekon. Poste li ne toleris la turmentadon, for de la hejmo migris diversloken. Eĉ dum tiuj tagoj li ankoraŭ verkis poemojn, kiuj notis lian doloron, malsaton kaj pensadon de tiu travivaĵo.

En la mansardo

Tro malalta estas la mansardo,
Kie mi vegetas sen konsolo.
Nek la homa voĉ', nek l' am-rigardo
Min karesas en la orfo-solo.
……
La malsato akompanis lin:
Malgraŭ la protesto de l' stomako
manĝas mi nur foje en la tago
sen viand', sen sup', nur seka pano
por l' poet' skeleta en malsato.

Spite al la terura "ruĝa teroro", li verkis poemon *Ĵuro* omaĝitan al D-ro L. Zamenhof en 1966, kaj en 1967, kiam li restis en urbo Nankino, sciante la

informon de la forpaso de Julio Baghy, lia "poezia paĉjo", li verkis poemon *Adiaŭo al Julio Baghy*, plenan de sincera funebro. "Kaj fideleco de la esp-istoj al sia afero, eĉ fronte al karcerigo kaj eventuale morto, estas konata." Lia kreado ĝuste atestas frazon de la paroloj de W. Auld!

Malgraŭ ke li orienten fuĝis, okcidente sin kaŝis, en noktomezo de la 20a de aprilo, 1968, policanoj entrudiĝis en lian hejmon – li estis arestita. Ĉi tie mi parolas pri epizodo: la policejo (tiam nomita ia revolucia komitato de urbo Tianjin sendis tri policanojn al redaktejo de El Popola Ĉinio en Pekino, por lerni Esperanton, celante trovi kriman atestaĵon el manuskriptoj kaj korespondaĵoj konfiskitaj el la hejmo de Armand Su! Ili lernis tri monatojn, tamen poste, ĉu ili fakte trovus ian "kriman atestaĵon"? Pri tio neniu parolis, kaj mi ne scias. Unue policanoj arestis iun, al kiu poste serĉis "kriman atestaĵon" , tia maniero preskaŭ estis ĝenerala en la tiama periodo de despotisma reĝimo. Tamen tio male konfirmas la "dediĉitecon" de esp-isto Armand Su – almenaŭ tri homoj lernis Esp-on pro li! Post unu jaro de enkarcerigo, li estis kondamnita pro krimo tiel nomata Kontraŭ Revolucio al punlaborado de 15 jaroj en prizono. Post kelkaj jaroj li refoje kondamnita al punlaboro de 5 jaroj, ĉar li en prizono malestime babilis pri k-ino Jiang Qing, la edzino de la granda gvidano Maŭ kaj pri viva stato de fremdlandanoj, lia mallibera tempo fariĝis 20 jaroj. Ho ve, la plej flora juna tempo de nia povra poeto travivis en la prizono, lia poezia kreado ankaŭ subite finiĝus.

Ne, la poezio neniam submetiĝas! Lia kolera voĉo fariĝis perloj en la poemoj:

En katenoj

Soldatoj kun pafilo min eskortis,
Jen min perforte puŝis, jen min tiris,
Dum mi en katenoj peze iris.

La tabulon grandan mi portis,
Sur kiu skribita mia nomo,
Ke mi estas la plej fia homo.

Por vi, kara patrolando, mi suferis
En malbenita prizono, en katenoj,
Kun al diktatoro mil malbenoj!
(1969)

La poeto pensis, lia ideologio sublimiĝis, konsiderante pri la konstitucio, li demandis:

Mensogo

*Laŭ **Konstitucio** oni*
Civitanajn rajtojn perdas
Nur tiam, kiam oni
Sub laŭleĝa aresto certas.

Antaŭ mia arestiĝo,
Estis mi plenrajta homo.
Kiom vi forrabis
El mia propra domo?
(1971)

Li komparis sin kun "povra birdeto', vokis pri "justeco" kaj "vero":

Mi estas povra birdet' sen flugilo,
Kaj estingita mia okulbrilo.
Jam eltirita ĉiu mia plumo,
Mi baraktas dolore en mallumo.

*Kie estas **Justeco**, kie **Vero***
Sur la vasta kaj granda ĉina tero?
Ho, Ĉinujo, ĉu vi honton ne sentis?
Ke la povran birdeton ne defendis?
(1972)

Legante la poemon *Nostalgio*, ni ankaŭ estas kortuŝita kun amara tristo:

Olda hejmo kara,
Bela mia nest'.
Rememor' amara
Post mia arest'.
……

Li skribis tiujn versojn sur paperaj pecoj, kiuj bedaŭre estis konfiskitaj de la prizona instanco. Poste li nur ĉizis tiujn poemojn en sian memoron! Mirakle, dank' al lia memoro ni povas legi tiujn poemojn, kiujn verkis li en la prizono! Tiuj poemoj estas pli maturaj ideologie, profunaj sente, faris lian poezian kreadon al la kulmino! Lia pensa tereno ne estis plu malplena papero, ĉar li ellernis la konsideradon, priatentis la homan vivon. Jen la klarigo pri la tiama furora vorto Diablo (al kiu la poeto mem apartenis):

En la vortar' de plej nova viv-epoko,
Diabl' estos en la honora loko.
Signifas ĝi nur homojn kun nobla koro
Spite al superhoma tortur', doloro,
Persistas en la neskuebla Vero
Kaj batalas por la tuta Libero.

(1973)

Kiam finiĝis "tiu koŝmaro", nia poeto paraliziĝinta sur malsanula lito, atakita de apopleksio, estis elportita sur brankardo el la prizono en 1978, post la kuracado li denove reaperis inter esperantistoj, kaj versis plu. Li vokis al nia leĝo:

Vin mi kantas, nia leĝo digna
De mia Patroland' indigna.
Protektant' nia viv' feliĉa
Garanti' por la kultur' riĉa.

Por akiri vin en viv-mizero,
Kiom sango verŝis sur la tero,
Kiom baraktis en fiprizono,
Sopirante pri via eksono.

Nur hodiaŭ vi fine naskita.
Diktatoro estu kondamnita.
La popolo voĉas pri l' venko
Kun al estontec' plena konvinko.

(1980)

Li omaĝe donis sian plej belan kanton al "komunisma batalantino" s-ino Zhang Zhixin, kiu kuraĝe kontribuis sian vivon por defendi la veron :

……

Vi rezignis ĉian homan ĝojon
Kaj suriris la martiran vojon.
Vi oferis la plej karan vivon
Por doni al ĝi pulsan signifon.

Kiam kuglo trafis vian koron,
Tuta lando dronis en doloron,
leĝ' plorsingultis, vin ne protektis,
kaj nur Morton jen por vi elektis.

Mortis vi, komunistin' fidela
En karcero – loko plej malhela.
Tamen vivos la spirita forto
Spite al la kondamno de l' morto!

1980

Liaj kvar eposoj verkitaj en la 60aj jaroj de la pasintaj jarcento aperis en tiama fama revuo *Monda Kulturo*, en kiuj li rakontis al la okcidentaj legantoj tri ekzotikajn historiojn el la ĉinaj legendoj: *la Avo Malsaĝa, La Tria Fratino Liu, Liang Shanbo kaj Zhu Yingtai*; alia estis *La Ruĝa Velo*, rakonto el la soveta kolorfilmo. Legantoj admiris lian poezian taleton, li jam estis fame konata poeto sur la Verda Parnaso, kvankam en lia patrujo preskaŭ neniu konis lian krean atingon kaj lian nomon.

En la 23a de septembro, 1990 Morto senkompate forprenis tiun talentan poeton el inter ni! Nu, ĉi-jare li jam forpasis 30 jarojn! Tamen liaj poemoj plenaj de juneca ĉarmo, naiva sentimento kaj kolera voko post la dolora konsiderado restas inter ni, kiuj sonis, sonas kaj certe sonos en la Verda Mondo. Li amis sian patrujon, sed pli amis la liberon, justecon kaj veron. Nia patrujo ankaŭ povas fieri, ĉar Ŝi iam bakis tian genian junan poeton!

Do, legu iom da liaj poemoj! Eble tio estas la plej bona memoro al li dum la alveno de la 30a jubileo de lia forpaso!

2020-01-15, Tailai

Notoj:

1) W. Auld: Enkonduko en la originalan literaturon en Esp-o, Iltis, 1979, p.12
2) Same de 1) p. 15-16

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_
Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Retadreso: vejdo@163.com
www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm
_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_